

Heinrich Heine,  
 Surflugiloj de la kanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Surflugiloj de la kanto  
 Al Gango vi lasu vin  
 Forporti de via amanto  
 Al plej bela lok', karulin'.

Jen kuŝas en la lunbrilo  
 Floranta lotus-ĝarden',  
 Aperas en la trankvilo  
 Sorĉigaj feinoj jen.

Karese la violetojn  
 Subridi jen aŭdas vi,  
 Rakontas odorajn sekretojn  
 La rozoj inter si.

Gazeloj alsaltas maltime,  
 Mallaŭte nur tra la aer'  
 Aŭdigas de malproksime  
 Susuro de l' sankta river'.

Ni volas ekkuŝi tie,  
 En arbareto sub palm'  
 Ripozi kaj am-ebrie  
 Songadi en nokta kalm'.

*Traduko de la Germana poemo "Auf Flügeln des Gesanges" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-540-1080 (2010-05-23 23:03:44)*

*El la „Libro de l' Kantoj“, lirika intermezo.*